

**NIA VOĈO**  
**Madrida Esperanto-Liceo**

San Alejandro 6-4<sup>B</sup>-Ext. 28005 Madrid  
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3<sup>o</sup>-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

**SEPTEMBRO-OKTOBRO 2003**

**ESPERANTO ALILOKE**

En ekspozicio en Madrido-"Círculo de Bellas Artes" pri la Internaciaj Brigadoj kiuj partoprenis la hispanan civilan militon, troviĝas en la fako "Propagando", afiŝo eldonita tiuepoke en Esperanto de la Kataluna Registaro. "Kion vi faras por eviti tion?" (meze bildo de ponardoj kiuj eliras el Germanio kaj Italio super Hispanion) "Geesperantistoj el la tuta mondo agu energie kontraŭ la internacia fashismo" (kompreneble la ĉapeloj aperas tute ĝuste en la originalo). "Eldonita de Comissariat de Propaganda de la Generalitat de Catalunya"

Alia malrekta esperantaĵo estas la apero de la germana verkisto Ludwig Renn (komunista esperantisto, komandanto de grupo de la Brigadoj). Li aperas kaj estas menciata en foto dum mitingo de La Pasionaria. Li ankaŭ aperas en alia foto en la libro eldonita tiuokaze, kaj kiu vendiĝas en ĝeneralaj librejoj. (Sed oni ne mencias lian esperantistecon)

Fine de Augusto parolistoj de la nacia programo "La Ínsula Barataria" de Onda Cero Sevilla registris telefonan intervjuon al Toño del Barrio, Miguel Gutiérrez Adúriz kaj Marcos Cruz, okaze de la nova vortaro Hispana-Esperanto kaj ĝenerale pri Esperanto.

La juna asocio "IZQUIERDA Y ESPERANTO SATEH" havis budon pri Esperanto en la festo de la komunista partio (La Fiesta del PCE), okazinta meze de septembro en la Casa de Campo de Madrid.

**NOVA LIBRO EN ESPERANTO**

En la 68a Hispana Esperanto-Kongreso, okazinta en Valencio, oni prezentis la verkon en Esperanto de Antonio Ruiz Negre, "Intrigo-teatro", kiu konsistas el tri teatraĵoj, esperantigitaj de Julio Tarín kaj Santiago Miquel. La libro estas eldonita de Grupo Esperanto de Valencia.

**CENTJARIĜO DE LA ESPERANTO-MOVADO EN HISPANIO**

Inaŭguro de la prihistoria fako de nia retpaĝaro, kaj per reta mesaĝo al amaskomunikilo informanta pri la komenco de la kampanjo kaj la nova vortaro.

Kadre de la kampanjo celebri la centjariĝon de la organizita Esperanto-movado en Hispanio, pri kiu ni baldaŭ informos ĉiujn HEF-anojn, pretas jam la historia retpaĝo, kiun ni proponas viziti: <http://www.esperanto-es.net/historio/> Kunlaboremuloj pri la historia retpaĝo bv. kontakti ([tonyodelbarrio@teleline.es](mailto:tonyodelbarrio@teleline.es)) aŭ HEF.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

LA UNUAN LUNDON DE OKTOBRO NI KOMENCOS NIAJN LUNDAJN KUNVENOJN,  
je la 18,30 en str. Rodríguez San Pedro, 13, 3<sup>o</sup>, 7. Tel. 91 446 80 79

**VENONTAJ KONGRESOJ**

11-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo. 4-11 oktobro. Santa Susanna (Barcelona)

**GRANDA VORTARO**

Jam estas en la oficejo de HEF la GRAN DICCIONARIO ESPAÑOL-ESPERANTO. La oficejo malfermas lunde kaj ĵaude, de la 6a ĝis la 9a vespere. Fakte, konvenos al la mendintoj telefoni (914 468 079) antaŭ ol veni, por certiĝi pri la plej taŭga horo.

HEF

Boletín disponas pri propra retadreso: [bulteno@esperanto-es.net](mailto:bulteno@esperanto-es.net) Bv. noti kaj uzi ĝin por sendi viajn materialojn al nia bulteno, kaj por kontakti la redaktiston pri Boletín-aferoj.

Por kreskigi kaj pliefikigi nian asocion, iom post iom ni celu, ke ĉiu volontulo kunlaboru efike pri unu sola tasko ol efikete pri pluraj, kaj laŭeble pri tasko pri kiu ŝi/li kompetentas. Multfoje ne eblas elekti, pro manko de homoj pretaj kaj kapablaj respondi la necesajn taskojn, sed feliĉe la reto ebligas multajn novajn laborrimedojn, kiujn nia asocio nur nun ekekspluatas.

Ĝis nun la informpetajn retmesaĝojn venintajn al [info@esperanto-es.net](mailto:info@esperanto-es.net) prizorgas du -- soletaj, Manuel Pancorbo kaj Marcos Cruz. Pro lastatempaj laborstreĉoj Manuel ne povas regule zorgi la aferon, eĉ devis rezigni pri aliaj taskoj en la asocio. Marcos devas pli da tempo dediĉi al la konstruado de la HEF-retpaĝoj (ankaŭ por kio necesas volontuloj, pri kio oni informos alimesaĝe). Tial necesas homo kiu zorgu la retan informservon, lau jenaj petataj postuloj:

- 1) Bona regado de la hispana laŭ ĉiaj aspektoj. Mesaĝoj al informpetintoj estu bonestile redaktataj kaj havu eĉ ne (mal)mankantan akcentilon aŭ mispunkton. Ni estas prilingva kaj kultura asocio kaj alimaniere ni impresus aĉe.
- 2) Bona regado de Esperanto. Ja Esperanto estas la afero.
- 3) Eblo dediĉi ĉ. 10-30 minutojn tage por atenti la mesaĝojn. (Se escepte dum tagoj ne eblus, Manuel au Marcos reprenus provizore la taskon).
- 4) Emo afable atenti interesitojn kaj informi neutrale, sentrude kaj objektivite pri la demanditaj aferoj.
- 5) Sufiĉaj laborkono kaj sperto pri retroŝto kaj TTT. Pri tio tamen ni helpas kaj konsilos komence se necese. Sed ja eblo konektiĝi al la reto hejme kaj ĉiutage estas nepra.
- 6) Responso, bona karaktero, bona humoro... Beleco tamen tute ne necesas, ni du vivantaj pruvoj garantias tion.

Kompreneble la nova responsulo havos chian helpon de ni kaj aliaj kiam necese, samkiel ni foje petis kaj ricevis helpon. Krome la posteno ne estos eterna... Espereble iom post iom la diversajn taskojn de la asocio prenos novaj homoj laŭvice. Fakte tio estas la celo: tio montrus, ke ni kreskas kaj pliefikiĝas. Interesitoj turnu sin al Marcos [info@esperanto-es.net](mailto:info@esperanto-es.net)

#### INTERRETO KAJ ESPERANTO

Daŭre kreskas la nombro da retaj informiloj en nia lingvo. Laste aperinta, kun tre interesa enhavo, estas "Libera Folio": <http://folio.xrs.net> .

La veterana revuo "Espero Katolika", jam 100-jara, estas nun legebla ankaŭ rete: [www.ikue.org](http://www.ikue.org)  
Pluraj kanzonoj en Esperanto, luditaj de brazilaj artistoj, estas elshuteblaj laŭ formato MP3 en la retpaĝaro de la Kultura Kooperativo de Esperantistoj de Rio de Janeiro: [www.kke.org.br](http://www.kke.org.br) ,  
esperanta fako, rubriko "Muzikaro".

Aliflanke, eblas auskulti dum 24 horoj, tage kaj nokte, esperantan muzikon en [www.radio-esperanto.com](http://www.radio-esperanto.com)

.....

#### **ESPERANTO LICEO DE MADRID**

**San Alejandro 6-4ºB. Ext**

**28005 Madrid**

Asociación de Utilidad Pública Municipal